

2022-2023: Eksterordinara jaro por Esperanto kaj lingvaj demandoj en Unuiĝintaj Nacioj; sed la vojo restas longa



La 13-an de septembro 2022 komenciĝis la 77-a sesio de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), kiun malfermis ĝia nova hungara prezidanto, Csaba Kőrösi. Ĉi-foje la orienteŭropa geografia grupo de la membraj ŝtatoj de UN povis proponi kandidaton por la posteno. La grupigo de 23 membraj ŝtatoj oficiale anoncis jam komence de decembro 2021, ke ĝi nomumas Csaba Kőrösi al la posteno. Inter 2010 kaj 2014 ambasadoro Csaba Kőrösi gvidis la Konstantan Mision de Hungario al la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko. Poste li estis direktoro de la Oficejo de la Prezidento de la Respubliko, okupiĝanta pri ekologia daŭripoveca evoluo. Li sendis sian programon skribe al la membraj ŝtatoj en februaro, kaj lia programprezentado okazis la 5-an de majo 2022 ĉe UN. La 7-an de junio la reprezentantoj de la membraj ŝtatoj de UN per aklamado elektis lin prezidanto.

Lia Ekscelencojam la 5-an de majo, dum sia kandidata interparolo kun la ambasadoroj de la membroŝtatoj de UN kaj reprezentantoj de neregistaraj organizoj (NROj), respondis al Profesoro Francis Hult, kiu direktis al li la jenan demandon nome de Universala Esperanto-Asocio:

Havante ses laborlingvojn, la Ĝenerala Asembleo donas centran lokon al multlingvismo en sia kunlabora problemsolva funkciado. Krome, pro la urĝa bezono de rekonstruo post KOVIM-19 kaj la esenca laboro por la Celoj por Daŭripova Evoluigo, komunikado kun la

civila socio per lingvoj kiujn la homoj komprenas estas pli esenca ol iam ajn. Kiel neregistara organizo en konsulta statuso kun UN kiu antaŭenigas pacon per interkultura kompreniĝo, Universala Esperanto-Asocio (UEA) scivolas kiel la kandidato antaŭenigos multlingvismon en la ĉiutaga laboro de la Ĝenerala Asembleo kaj subtenos daŭran multlingvan kapablokonstruadon en la pli vasta UN-komunumo.

S-ro Csaba Kőrösi respondis per jenaj vortoj:

Sinjoro Hult, el Esperanto-Asocio! Vi parolas el mia koro, kvankam mi ne parolas Esperante; sed hazarde mi estas amiko de unu el viaj gvidantoj, kiu konstante rakontas al mi pri la graveco de Esperanto rilate al pacokonstruado kaj al pli bona kompreno.

Kun via permeso mi ŝatus peti vin kaj viajn kolegojn veni por konsultiĝo. Mi ŝatus akcepti vian konsilon, kiel Esperanto ne nur kiel lingvo sed kiel spirito de traktado kun homoj, traktado kun malsamaj komunumoj, malsamaj ideoj povas esti pli bone enigita en la laboron de la Ĝenerala Asembleo. Mi pensas, ke estas multe pli bone, se vi la fakulo povas diri al ni kiel uzi la scion ol provi elpensi ion, kion mi, kiu ne parolas Esperante, povus elpensi, sed mi ja dankas vin pro tio, ke vi starigis la demandon kaj mi kalkulos je via subteno kaj via konsilo.

Apenaŭ necesas diri, ke dum la jaro intervenis amaso da mondaj demandoj sur la tagordon de la Ĝenerala Asembleo, sed la starpunkto de Ambasadoro Kőrösi pri lingvoj kaj pri la lingva politiko de UN havis sian signifan influon: kreskis la atento al tiu ĉi tro ofte neglektata demando. Jam de jaroj la Ĝenerala Sekretario de UN, s-ro Antonio Guterres, emfazas la gravecon de multlingvismo, nome ke UN utiligu multajn lingvojn en siaj internaj kaj ĉefe siaj eksteraj kontaktoj, sed, manke de forta premo el ekstero, la sekretariato kaj la diversaj organoj de UN ne atribuis adekvatan urĝon al la demando. La intervenoj kaj demandoj de Amb. Kőrösi levis la lingvan demandon pli alten sur la tagordo de UN.

Faciligis la fakto, ke, nur du jarojn antaŭe, la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun UN, CoNGO, starigis, responde al propono de Universala Esperanto-Asocio kaj dudeko da aliaj NROj, apartan NRO-Komitaton pri Lingvoj. CoNGO havas plurajn NRO-Komitatojn en la tri sidejoj de UN (Novjorko, Ĝenevo, Vieno) – komitatojn pri paco, pri homaj rajtoj, pri virinaj aferoj, pri drogoj kaj diversaj aliaj temoj. Nun aldoniĝis tiu pri lingvoj. Profesoro Hult fariĝis ĝia prezidanto. La starigo de la komitato forte faciligis la aliron al Amb. Kőrösi kaj pliebligis liajn intervenojn pri lingvaj demandoj (procezo faciligita ankaŭ de la eksa prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio, s-ro István Szabolcs, kiu persone konis la ambasadoron). Aliĝis al la komitato pluraj grandaj internaciaj neregistaraj organizoj kiuj okupiĝas pri lingvoj, inkluzive la mondajn organizojn de tradukistoj (FIT) kaj interpretistoj (AIIC).

Konsultiĝo pri Lingvaj Demandoj en UN kun partopreno de UN-instancoj

La leviĝo de atento, rezulte de la fondo de la Komitato de NROj pri Lingvoj kaj aliaj kontaktoj, kaj la evidenta interesiĝo de la Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo pri lingvaj demandoj, kombiniĝis por antaŭenigi la laboron de UEA ene de UN. La nova Komitato pri Lingvoj havis la necesajn statuson kaj influon por lanĉi la ideon kunvoki kunvenon pri la temo lingva politiko de UN. Partnero en tiu elpaŝo estis ankaŭ la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, sendependa fakula reto de esploristoj kiuj specialiĝas pri multlingvismo. La Studogrupo havas longan historion ankaŭ atribueblan al UEA, kiu jam en la fruaj 1980aj jaroj komencis serion da ĉiujaraj simpozioj pri lingvaj demandoj en kunlaboro kun la tiama fako de UN pri konferencaj servoj.

Por ke la kunveno fariĝu oficiale rekonata, kaj UN-funkciuloj estu invitataj, necesis havi la subtenon de membraj ŝtatoj de UN. Kiam estis konate, ke la prezidanto de la Ĝenerala Asembleo apogas ĝin, rapide aliĝis kiel kunvokantoj la Konstantaj UN-Misioj de Andoro, Burundo, Ekvatora Gvineo, Ĝibutio, Hispanio kaj Kanado, kaj la Konstanta Observa Misio de la Frankofonio (francparolantaj landoj). Rezulte, estis kunvokita speciala kunveno kun gvidantoj de Unuiĝintaj Nacioj pri la temo *Konstrui Reciprokan Kompreniĝon pere de Multlingvismo*. La kunveno okazis la 12-an de junio 2023.

La kunveno mem estis multlingva, kun simultana interpretado en la ses oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj (la angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa). Krome, Universala Esperanto-Asocio kunordigis provizon de interpretado en Esperanto, fare de la teamo Duncan Charters, István Ertl, Edmund Grimley Evans, kaj Adrian Tanner. La Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj, kies prezidanto kaj vicprezidanto estas respektive la reprezentantoj de UEA al Unuiĝintaj Nacioj prof. Francis Hult kaj prof. Humphrey Tonkin, estis la ĉeforganizanto de la kunveno. Prof. Hult rolis kiel kunordiganto kaj gvidanto.

Inter la parolantoj estis pintaj gvidantoj de Unuiĝintaj Nacioj – plej notinde Lia Ekscelenco s-ro Csaba Kőrösi, prezidanto de la 77-a Ĝenerala Asembleo de UN. Aliaj pintaj gvidantoj kiuj intervenis estis s-ro Movses Abelian, Suba Ĝenerala Sekretario por Ĝeneralasemblea kaj Konferenca Mastrumado, kaj Kunordiganto de Multlingvismo en UN; s-ro Miguel de Serpa Soares, Suba Ĝenerala Sekretario pri Juraj Aferoj kaj Ĉefadvokato pri Politiko de UN, kaj s-ino Lisa M. Buttenheim, Asista Ĝenerala Sekretario pri Subtenaj Operacioj en UN. S-ro Abelian havas aparte ŝlosilan pozicion kiel ŝarĝito de la Ĝenerala Sekretario pri la fortigo de multlingvismo en UN.

La kunvenon alparolis pluraj UN-ambasadoroj: Lia Ekscelenco s-ro Zéphyrin Maniratanga, konstanta reprezentanto de la Respubliko de Burundo; L.E. s-ro Anatolio Ndong Mba, konstanta reprezentanto de Ekvatora Gvineo; L.E. s-ro Mohamed Siad Doualeh, konstanta reprezentanto de la Respubliko de Ĝibutio; Ŝia Ekscelenco s-ino Ana Jimenez de la Hoz, vica konstanta reprezentanto de Hispanio; L.E. s-ro Robert Keith Rae, konstanta reprezentanto de Kanado; L.E. s-ro Yuri Ariel Gala López, vica konstanta reprezentanto de Kubo; Ŝ.E. s-ino Ana Paula Zacarias, konstanta

representanto de Portugalio; kaj Ŝ.E. s-ino Ifigeneia Kontoleontos, konstanta observanto de la Internacia Organizo de la Frankofonio. Krome parolis s-ino Sofia Margaryan, konsilanto pri humanitaraj aferoj ĉe la Konstanta Misio de la Respubliko de Armenio.

Aliaj intervenantoj estis i.a. stabanoj de la Ekipo por Multlingva Agado ĉe la oficejo de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo kaj la Multsektora Regiona Oficejo de Unesko en Bangkoko, plus reprezentantoj de civilsociaj organizoj kaj sciencaj fakuloj. Civilsociaj reprezentantoj prof. Humphrey Tonkin de UEA kaj pastro Hans Becklin de TEJO, kiel ankaŭ scienca fakulo prof. Mark Fettes de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj la Universitato Simon Fraser, faris siajn rimarkojn en Esperanto. Aliaj parolantoj uzis la araban, anglan, francan, hispanan kaj rusan.

Prof. Tonkin legis la anglalingvaj rimarkojn de d-ro Liberato Bautista, prezidanto de la Konferenco de NROj, CoNGO.

Aparte signifan paroladon faris Ambasadoro Kőrösi mem, en sia rolo kiel kvazaŭa patrono de tiu ĉi grava kaj senprecedenca interparolo. Li liveris ĝin en kvar el la ses oficialaj lingvoj de UN:

Ekscelencoj,

[angle] *Sobh Bekheir* al ĉiuj. Ĉi tio signifas “bonan matenon” en la persa lingvo – la lingvo de Rumi, la poeto de la 13-a jarcento, kiu iam skribis: “Parolu novan lingvon, por ke la mondo estu nova mondo.” La influo de Rumi transpaŝis limojn kaj disvastiĝis dum sep jarcentoj. Kun tia historio, mi dirus, ke li certe sciis ion kaj alion pri multlingveco. Uzi la lingvon de iu alia ofte estas la ŝlosilo por sukcesoj. Ĝi povas signaligi geston, amikan intencon. Ĝi helpas nin renkonti unu la alian duonvoje. Ĝi povas lumigi niajn ideojn – kaj funkciigi rilaton. Ne ĉiuj lingvoj estas parolataj. Iuj estas nur skribataj. Aliaj estas parolataj. Sed taksante ĉiun lingvon ni pliiĝas niajn ŝancojn venki dubojn. Por konstrui, aŭ, en niaj tempoj, rekonstrui fidon. Por fari decidojn signifajn por ĉiuj. Jen kial ni renkontiĝas hodiaŭ: por kompreni kiel ni povas uzi multlingvecon por plienigi nian engaĝiĝon en manieroj kiuj faras diferencon.

[france] Plurlingveco estas fundamento de Unuiĝintaj Nacioj. Kaj ĝi estas unu el la antaŭkondiĉoj por nia sukceso kiam ni alfrontas ondon de tutmondaj defioj. Pasintjare la Ĝenerala Asembleo adoptis rezolucion pri plurlingveco. Ĝi bonvenigas la uzon de oficialaj kaj neoficialaj lingvoj fare de la Departamento de UN pri Tutmonda Komunikado en sia atingo al specifaj lokaj celgrupoj. Ĝi ankaŭ rekonas la klopodojn de la Sekretariato uzi neoficialajn lingvojn – kiel ekzemple la portugalan, la hindian, la kisvahilan kaj la persan – en niaj klopodoj lasi neniun malantaŭe.)

[ruse] Mia misio estas kreskigi toleremon, akcepton, reciprokan respekton kaj aŭtentan aprezon por diverseco de vidpunktoj. Kaj ĉiutage mi povas vidi kiel la kapablo paroli alian lingvon povas semi la semojn de kompreno inter partioj. Ofte, unu sola vorto en la lingvo de iu alia sufiĉas por rompi la glacieron.

La ses mil lingvoj parolataj tra la mondo montras la forton kaj riĉecon de niaj socioj. Ili ĉiuj subtenas kaj plibonigas nian signifoplenan ekziston. Ni devas konservi ĉi tiun antikvan

tapiŝon de esprimo. Ĉi tio validas precipe por lingvoj ĉe la rando de formorto, multaj el ili uzataj de indiĝenaj popoloj. Kiel tiel elokvente memorigas al ni Nobel-premiito Octavio Paz: “Por ĉiu lingvo kiu formortas, bildo de la homo malaperas.” Al tio mi aldonus: ankaŭ iom da nia homaro malaperas. Ni devas fari nian plej fortan eblon por malhelpi, ke ĉi tio okazu.

[arabe] Kiel ni povas servi la aferon de multlingvismo? Unue, antaŭenigante lingvan diversecon. Due, certigante ke junuloj havu aliron al edukado en sia gepatra lingvo. Kaj trie, eksponante junajn lernantojn al lingvoj aliaj ol iliaj propraj, por ke ili vere aprezu la mondon ĉirkaŭ si.

Ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ni devas trovi manierojn prioritatigi multlingvajn praktikojn. Uzi – kaj respekti la uzon de – kiel eble plej multe da lingvoj ĉi tie en nia organizo. Kaj ĉiam demandi: kion plu ni povas fari por transgrimpigi la murojn? La murojn de konvencio, rutino, rezigno kaj – ni estu sinceraj – maldiligento. Konsiderante tion, mi dankas la organizantojn pro la iniciato de ĉi tiu grava diskuto hodiaŭ. Mi deziras aŭskulti viajn ideojn, viajn sugestojn. Kaj mi esperas, ke ni ĉiam memoros la saĝon de Amy Chua: “Ĉu vi scias, kio estas fremda akĉento? Signo de braveco.”

La kunveno reprezentas la plej fortikan ĝisnunan utiligon de Esperanto en kunsido de gvidantoj kaj koncernatoj de Unuiĝintaj Nacioj. Tiurilate, temas pri sukcesa momento en la strategio de UEA por antaŭenigi la praktikon de multlingvismo en Unuiĝintaj Nacioj kaj malfermi pardonon al utiligo de multaj lingvoj, inkluzive Esperanton, por engaĝi pli larĝan tutmondan perspektivon – kio konsistigis la ĉefan temon de la kunveno. Kune, la parolantoj interdiskutis la demandon de fortigo de internacia kunlaboro pere de multlingvismo, faciligo de problemosolvado, kaj profundigo de interkompreniĝo trans diferencoj.

Multlingvismo, ebliganto de multflanka diplomatio, estas kerna al la laboro de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi efike plifortigas sekvadon de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj, inkluzive de la Celoj por Daŭripova Evoluigo. Ĉar ĝi estas antaŭkondiĉo de signifoplena dialogo, multlingvismo estas nepre antaŭkondiĉo por konstrui kompreniĝon kaj solidarecon inter homoj kaj nacioj surbaze de egaleco, kaj por dividi scion kaj identigi komunajn solvojn al la defioj kiujn la mondo alfrontas. Multlingvismo esencas por kunigi la komunumon de nacioj ĉe la decidopunkto, kaj por garantii efikan dudirektan komunikadon ĉe ties realigo. Adekvate fronti lingvan diversecon, interne kaj ekstere, estas ankaŭ antaŭkondiĉo por ke neniu homo postrestu, kaj ke ĉiu homo ricevu egalan pritrakton.

Flanke de UEA, oni ne argumentas por ekskluziva uzo de Esperanto: UN ĉiam havos bezonon rekte komuniĝi kun la popoloj de la mondo en iliaj diversaj lingvoj. Sed Esperanto proponas lingvan egalecon en situacioj kie tia egaleco estas bezonata. Kompreneble, se ĝi estus regule tiel uzata, ĝi fariĝus ĉiam pli ofta kaj konvena rimedo por krei lingvan egalecon inter malsamlingvaj partioj.

Je la fino de la mandato – adiaŭo, espereble nur dumtempa

La 5an de septembro 2023 finiĝis la mandato de Amb. Kőrösi kiel prezidanto de la 77-a sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN. Je tiu okazo, en la nomo de Hungaria

Esperanto-Asocio, ties iama prezidanto István Szabolcs direktis al la Ambasadoro la jenan mesaĝon:

“Via prezidanteco okazis en eksterordinaraj, preskaŭ senprecedencaj cirkonstancoj. Estas pluraj kialoj por diri, ke via prezidanta agado lasas daŭran markon. La devizo “Solvoj per Solidareco, Daŭripovo kaj Scienco” bone resumas ĝin ...

Vi enskribis vian nomon en la mondan historion de Esperanto invitinte nian tutmondan organizon partopreni en la laboro de la Ĝenerala Asembleo de UN. Dankegon pro la multaj eblecoj kaj pro via persona partopreno kaj subteno...

Per via prezidanteco la mondo certe fariĝis pli bona loko, interalie ĉar Esperantismo estas universala homa valoro, ĝi agas en la intereso kaj favoro de ĉiuj popoloj en la certa espero de pli bona estonteco...

Poste, skribis s-ro Szabolcs jene: “Eble mi ne malobservas la intimecon de la korespondado nek la diplomaciajn kutimojn, kiam mi citas frazon el lia respondo: *“Estis bone aŭdi la voĉon de trankvilo kaj paco de tempo al tempo en viaj leteroj, same kiel de la parolantoj reprezentantaj vin.”*

S-ro Szabolcs kundividis kun la membraro de HEA kaj kun la legantoj de la retpaĝo de HEA en Esperanto la finajn rimarkojn de Csaba Kőrösi kiel prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. La teksto (kiu ne rekte aludas la lingvan demandon sed tuŝas plurajn aliajn internaciajn problemojn konatajn de esperantistoj kaj internaciistoj ĝenerale) sekvas.

Fermo de la 77-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN

Parolado de Csaba Kőrösi, Prezidanto de la 77-a sesio de la Ĝenerala Asembleo, 100-a plenkunsido 5 septembro 2023

*Sinjoro novelektita prezidanto,
Sinjorino vica ĝenerala sekretario,
Ekscelencoj, eminentaj delegitoj,
Karaj kolegoj kaj amikoj,*

Mi fieras stari antaŭ vi en la lasta kunveno de la 77-a sesio de la Ĝenerala Asembleo.

Mi volas lasi ĉe vi kvin ĉefajn pensojn:

La unua estas ke, **spite al geopolitikaj rivalecoj, nia supervivo dependas de nia kunlaboro.**

Ni havas abundajn sciencajn atestojn, ke ni fartas bone en la Antropoceno – epoko markita de la decida efiko de homoj sur la planedo.

Komence de mia mandato, mi invitis vin rigardi nian laboron tra la lensoj de krizadministrado kaj daŭripoveca transformo. Tia aliro povus permesi al ni rebati la tutmondajn krizojn kiujn ni mem kaŭzis.

Geopolitikaj rivalecoj estas parto de la realo, sed ni ne forgesu: ili baras multajn perspektivojn de la necesaj solvoj kaj urĝaj kunlaboroj.

Fortirante nian fokuson for de daŭripova transformo, geopolitika aŭ ideologia konkurenco kutime sekvas pli mallarĝajn, ofte mallongperspektivajn interesojn. Tamen, ĉe la Akva Konferenco en marto, vi pruvis, ke eblas venki longdaŭrajn dividojn. Ni jam montris, ke ni povas reestabli fidon kaj konstrui sur areojn de komuna grundo.

Ĉi tio alportas min al mia **dua mesaĝo**, ke **ni vetkuras kontraŭ la tempo.**

De klimata ŝanĝo kaj perdo de biodiverseco ĝis edukado kaj seksa egaleco – nia ŝanco atingi la Celojn por Daŭripova Evoluo antaŭ 2030 forglitas.

Ni metu nian monon tien kie estas niaj promesoj, do avantaĝe al senescepte ĉiu membra ŝtato.

Ĉu ni pretas transformi la necesajn agojn por daŭripoveca transformo en ŝlosilajn buĝetajn prioritatojn? Kaj hejme kaj en la internaciaj organizoj? Subteni daŭripovon per taŭgaj regularoj, financado, kapablo-konstruado kaj kontrolo estas unu el niaj plej urĝaj taskoj.

Kio tuj necesas nun estas efektivigo de tio, kion ni promesis liveri al niaj ok miliardoj da akciuloj. Ni komencas taksu tion, kio gravas. Kaj ni komencas kompreni, ke ni devus iri „*preter MEP (Malneta Enlanda Produkto)*” por kompreni la realajn efikojn kaj la plenan koston de niaj agoj, inkluzive de ĉiuj pozitivaj kaj negativaj kromefikoj – egale ĉu intencitaj aŭ neintencitaj.

Kaj tio signifas, ke ni komencas konfidi sciencojn kaj datumojn. La venontaj ok ĝis dek jaroj estos decidaj por niaj komunaj perspektivoj. Kaj ni klarigu: multflankismo estas nia sola elekto por trakti la multajn krizojn de la mondo.

Mia tria mesaĝo estas, ke **ni ĉiuj respondecas pri niaj agoj kaj neagoj.**

Niaj respondecoj devas ĉiam esti konsiderataj same gravaj kiel niaj rajtoj. La tri kolonoj de Unuiĝintaj Nacioj estas paco kaj sekureco, evoluigo kaj homaj rajtoj. La publiko vidas ĉi tiujn kiel niajn respondecojn. Ĉu ni vivis laŭ ili? Ĉu ni povas rigardi la konfliktojn tra la mondo kaj diri, ke ni subtenas la Ĉarton de UN?

La milito en Ukrainio – kune kun aliaj 51 armitaj konfliktoj – devas finiĝi, konforme al la Ĉarto de UN kaj internacia juro.

Hodiaŭ mi ripetas mian alvokon al vi ĉiuj ĉesigi nuklean dismultiĝon kaj nuklean armilaron.

La Ĉarto de UN rajtigas la Ĝeneralan Asembleon konsideri principojn regantajn malarmadon kaj armillimigon. Mi instigas la Asembleon pripensi ĉi tiun punkton.

En decembro, estos pasintaj 75 jaroj de kiam la Ĝenerala Asembleo proklamis la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj. Ĉu ĉi tiu datreveno ne memorigas, ke la sekureco de nia estonteco dependos de tio kiel ni akceptas niajn respondecojn?

Antaŭ nur unu jaro, la Ĝenerala Asembleo adoptis historian rezolucion kiu deklaris, ke aliro al pura, sana kaj daŭrigebla medio estas universala homa rajto. Sed estu klarigite, kiu respondecas pri la efektivigo.

En la lastaj monatoj, vi konsentis peti la opinion de la Internacia Kortumo pri la devoj de landoj trakti klimatan ŝanĝiĝon.

Ni apenaŭ komencas kompreni kaj malpaki kion rajtoj kaj respondecoj signifos en la sekva etapo de nia Antropoceno. Ĉiam pli ofte, niaj gejunuloj estas tiuj kiuj memorigas nin kiam ni ne sukcesas agi. Ili kulpigos nin pri niaj neagoj.

Mia **kvara** mesaĝo estas, ke **nur integritaj solvoj estas “estonteco-imuna”**.

Ili rigardas antaŭen kaj kapablas sorbi venontajn ŝokojn. La multflanka sistemo postulas kunlaboron sur tutmonda skalo – inter landoj kaj regionoj sed ankaŭ trans disciplinoj kaj kampoj -- kun bone evoluigita metodaro kiu kunigas datumojn kaj tendencojn el ĉi tiuj kampoj.

De traktado de klimata ŝanĝiĝo kaj kiber-krimo, ĝis respekto de homaj rajtoj interrete kaj la uzo de artefarita inteligento, ni devas kuniĝi ĉirkaŭ kompletisman aliron.

Ekster ĉi tiu Halo, homoj perceptas unuecan UN kaj atendas, ke ni agu kune por subteni signifoplenan ŝanĝiĝon en iliaj vivoj. Nia fokuso Dum ĉi tiu sesio ni fokusiĝis je trovado de integritaj solvojn, kiuj havu konkretan efikon por viaj civitanoj. Ni scias, ke sendependaj procezoj liveros nur sendependajn rezultojn. Integritaj solvoj, mi ripetas, implicas datumojn, kontrolon kaj financadon.

Post la venonta Pintkonferenco pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo, ĉio dependos de vi, membraj ŝtatoj, por vivigi la daŭripovan transformon.

Por la supervivo de la homaro, ĉu vi pretas financi ĝin? – en senescepte ĉiu lando? – reordigante elspezojn, kaj plifortigante internacian kunlaboron pri daŭripovo?

Ĉu vi faros pli por kontroli tion, kion vi efektivas? Ĉu vi povas eliri el artefaritaj vertikalaj siloj favore al ampleksaj solvoj?

Se jes, la horo por redifini niajn prioritatojn kaj agojn estas nun.

Mi instigas vin konservi la fokuson sur integraj solvoj se vi volas akiri la plej bonajn rezultojn por viaj rimedoj, kaj se vi volas ŝanĝi la realon.

Mia **kvina** mesaĝo estas, ke **ni devas urĝe reformi UN** en manieroj kiuj respondas al la defioj de nia epoko.

La unua pasaĝera jetaviadilo de la mondo transportis 36 pasaĝerojn en 1952. Temis pri trabato en teknologia evoluigo. Sed tio ne signifas, ke ni povas uzi ĝin hodiaŭ por porti nin al Marso.

Evoluas la tempoj: tiu ĉi Organizo devas same evolui. Ni devas reformi la funkciadon de la Ĝenerala Asembleo. La samo validas rilate la Sekurecan Konsilion.

Mi agnoskas, ke la Ĉarto de UN ne faciligas tiun taskon. Sed, ĝis ni ŝanĝos ĝin, nia tasko estas apliki ĝin.

Tio signifas eviti selekte apliki ĝin en okazoj de konflikto-limigo, amasaj abomenaĵoj, genocido kaj aliaj militaj krimoj. Se ni ne faros, la Sekureca Konsilio pli ofte rolos kiel problemo ol kiel solvo al la malstabileco de nia mondo.

Oni diras, ke “la pesimisto plendas pri la vento; la optimisto atendas ke la vento ŝanĝiĝu; la realisto ĝustigas la velojn.”

Ni ĝustigu niajn proprajn velojn ĉi tie en la Ĝenerala Asembleo.

Ĉi tiuj demandoj substrekas la bezonon de integriĝo kaj reformo tra la tuta UN, por ripari konfidon ene de – kaj apud – nia organizo. Kaj ankaŭ por konservi ĝian aktualan gravecon.

Ni konfesu, ke al politikofara instanco kun pli ol 180 prioritatoj mankas strategia direkto.

Hereditaj kaj ripetemaj debatoj okupas tro multe de nia tempo. Jes, ili estas gravaj; sed ĉu ili malhelpu nin serĉi ludoŝanĝilojn por niaj aktualaj kaj novaj situacioj ĉe la horizonto?

Ni ne perdu la arbaron pro la arboj.

Refortigi malnovajn poziciojn el antikvaj debatoj ĉiam nur signifas, ke ni pretervidas la aktualajn defiojn.

Kiu plej suferos? La plej vundeblaj landoj kaj komunumoj, sen ajna dubo.

Bonvolu teni tion en memoro kiam vi abandonas kunlaboron kaj klopodas transformi ĝin en nulsuman ludon.

Ni ne povas atendi malsamajn rezultojn per rigidaj ripetoj de pozicioj, per tenado de “jam interkonsentita vortumo” – senkonsidere kiel “longdaŭra” tio estu.

Sinjorinoj kaj sinjoroj, permesu al mi resumi.

Ĉiam ekzistos politikaj rivalecoj.

Sed tio ne signifas, ke ni devas enfali la nulsuman kaptilon, en kiu ĉiu gajno de unu lando estas perdo flanke de alia lando.

Inteligenta decidofarado, komence per komuna konsento pri ŝlosilaj rezolucioj ĉi tie en la halo de la Ĝenerala Asembleo, liverus la puŝon necesan por ke multaj agantoj en la mondo brakumu la venontajn defiojn.

Ni devas difini la vojon irendan, kreante pli efikan daŭrigeblan transformon, kiu estu reciproke utila por ni ĉiuj.

Ĉio ĉi estu farita nun, ĉar ni konkuras kun la tempo.

Ne ekzistas plano B, neniun planedo B, kiel ni ofte aŭdas.

Tutmonda financo ankoraŭ ne laboras por helpi nin pri klimata ŝanĝiĝo. Nek por protekti la plej vundeblajn inter ni.

Tial ni devas agi urĝe, por protekti nian komunan pluivivadon.

Niaj agoj kaj neagoj levas la demandon de respondeco – al la planedo, kaj unu al la alia. Jen nia komuna devo.

Kiam oni malobservas la internacian juron aŭ la Ĉarton de UN, kaj ni nenion faras – ni kaŝas nin for de nia komuna respondeco, ni ĉiuj forfrotas nian multflankan sistemon.

Kaj ni trompas la homojn, kiujn ni reprezentas. Ĉi tiu preterlaso pridubas nian gravecon, nian komunancelon. Jen kial tiu ĉi granda organizo bezonas reformon konforman al la defioj de hodiaŭ kaj morgaŭ.

Ni devas moviĝi lerte.

Kiel organizi ĉi tiun reformon? Interalie, per scienco.

Tio estas mia kerna mesaĝo al vi hodiaŭ, same kiel ĝi estis kiam mi unue staris en ĉi tiu sama halo antaŭ unu jaro.

Scienco estas unu el la plej gravaj formiloj de nia kompreno de la realo sur kiu bazaj decidoj devus esti faritaj.

Scienco ne estas ĉiopova sed disponigas objektivan atestonkaj pruvitan scion. Ĝi estas la ilo por helpi nin plifortigi nian kunlaboron kaj gvidi nian decidon. Ĝi ne kontraŭas ies nacian aŭ kulturen heredaĵon. Ĝi estas vojo por konfirmi tiun heredaĵon en niaj decidoj.

Dum la ĵusa deĵorperiodo ni enlasis sciencon: ni ne forpuŝu ĝin en la venontaj.

Permesu al mi nun kapti momenton por danki vin.

Al vi, la membraj ŝtatoj, mi memorigas, ke la rezultoj de viaj intertraktadoj, renkontiĝoj, neformalaj kaj temaj eventoj, konsistigas niajn solvojn al la problemoj de la mondo.

La rezolucioj de la Ĝenerala Asembleo estas via komuna modelo, via komuna heredaĵo.

Ĉi-periodon, mi nomumis tridek kunfaciligantojn kaj kunprezidantojn por la diversaj negocoprocedoj.

Nome de vi ĉiuj, mi dankas ilin kaj iliajn teamojn pro la sindediĉo kaj persistemo tra la tuta pasinta jaro.

Dankon pro ĉi tiu kunlaboro.

Mi esprimu mian profundan dankon al la Vicprezidantoj de la Asembleo, la Prezidantoj de la Ĉefaj Komitatoj.

Mi dankas la Ĝeneralan Sekretarion kaj la Vican Ĝeneralan Sekretarion pro ilia fido kaj ilia sincera kaj celkonscia kunlaboro.

Same mi dankas la kolegojn ĉe la Sekretariato, precipe ĉe la Departemento de Ĝeneralasemblea kaj Konferenca Administrado, kies gvidado kaj subteno estis vere helpemaj.

Specialan dankon iru al la membroj de mia Konsilkomitato pri Genraj Demandoj.

Kaj mi volas danki mian teamon. Se vi ŝatas tion kion faris mia Oficejo dum ĉi tiu periodo – la subtenon, kiun vi ricevis, la gvidadon, la kreemon, tio estas ĉar mi havis tre bonan teamon.

Kaj du trionoj de ĝi konsistis el virinoj, multaj el ili patrinoj. Ni eĉ havis tri novnaskitajn bebojn dum la sesio – memorigo pri tiuj al kiuj ni postlasas ĉi tiun mondon.

Kaj la plej granda simbolo de espero.

Mi deziras al mia posteulo, elektita prezidanto Ambasadoro Dennis Francis tre produktivan prezidantecon, kaj mi deziras al vi ĉiuj sukcesojn kaj decidojn pri kiuj vi ĉiuj povos esti fieraj.

Dio benu vin ĉiujn, Dio benu Unuiĝintajn Naciojn!